1-a jaro n-ro 00 junio 2024

Afrika Esperantisto

Tutmonda afero per loka agado

Sendependa bitrevuo

*Karaj legantoj,*

*Por povi informi, instigi vin kaj plupartopreni en la klopodoj pri la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto, ni taskis al ni krei novan revuon. Tiu ĉi informilo celas esti adekvata rimedo, kiu publikigos individuajn kaj asociajn planojn, ideojn kaj atingojn de agantoj en ligo kun Esperanto kaj aparte en Afriko. Temas pri ilo por la afrika esperantisto por ties persona evoluo kaj tiu de la tutkontinenta komunumo.*

*Tiu ĉi prova numero de la revuo markas la komencon de nova redakcia aventuro. En la sekvaj paĝoj vi trovos buntajn kaj interesajn artikolojn, skribitaj el diversaj kampoj. Bonvolu tralegi ilin, kaj kunhavigi viajn impresojn kaj sugestojn kun ni.*

*Via opinio estas tre grava paŝo por helpi ĉi tiun novnaskiton kreski kaj flori!*

*Bonan legadon!*

***La redakcio***

**Kontaktinformoj de la redaktejo**
**Retpoŝtadreso:**
**contact.adjevi@gmail.com**
**06 B.P. 61807 Lomé –TG**
**Togo**
**Tel.: +228 99 57 26 23**

# 109-a UK: senpaga veturigo por la 57-aj ILEI-kongresanoj

Restas ekzakte 54 tagoj antaŭ la eko de la 109-a UK, la plej prestiĝa E-renkontiĝo en Esperantujo, okazonta en Aruŝo de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024.

541 homoj el 62 landoj jam enskribiĝis por la aranĝo, celanta celebri unuafoje en la historio Afrikon kaj Esperanton. Ĉu vi scias, kion tio signifas? Restas ĉ. 459 aliĝintoj por atingi la antaŭviditan nombron de UK-anoj!

La enskribiĝo pluokazas kaj la LKK ne dezirus, ke eblaj partoprenantoj ankoraŭ hezitantaj maltrafu tiun historian okazon (re)viziti Tanzanion en unika universala E-etoso! Se vi iam havis intencon vojaĝi al la kontinento de Nelson M. Mandela, de Wangari M. Maathai kaj aparte al la lando de Julius K. Nyerere nun estas la tempo tion fari.

Se vi bezonas iom da kroma instigo por decidi, jen kion ni proponas al vi: senpagan veturigon de la flughaveno Kilimanĝaro al la kongresurbo. Valoro de tiu ĉi gratifiko en monkvanto estas 50 €!

Atentu tamen, ke tiu ĉi senpaga oferto celas ILEI-ulojn kaj ĝi validas por tiuj, kiuj estos en la 57-a ILEI-kongreso en Brazilo kaj kiuj registriĝos por la 109-a UK inter la 20-a kaj la 27-a de julio 2024. LKK volas rekompenci tiujn, kiuj faras rapidajn decidojn. Bv. pripensi kaj decidi!

Se vi havas demandojn pri la kongreso ĝenerale, skribu al: *kongresoj@co.uea.org*

Ĉar la LKK deziras igi la restadon de ĉiuj en Aruŝo agrable neforgesebla, specialaj surprizoj atendas ĉiujn kongresanojn surloke.

**Costantine S. Mashauri**

# Togolanda aktiveco kun bona humuro



La tradicia kunveno de lomeaj e-istoj, konata ankaŭ sub la nomo babilmanĝo, post du-monata paŭzo, rekomenciĝis kaj la unua renkonto de la jaro okazis kun partopreno de 10 homoj la 23-an de marto 2024.

Ene de la aktivaĵoj la kunveno pritraktis la sinprezenton de la kunvenantoj; la vortojn trinki/drinki, fi/aĉ, de/da, per/kun en formo de konversacia kurseto; legadon de teksto en la februara revuo Esperanto pri E-kulturo; proponon de grupa studvojaĝo ekster la ĉefurbo por la fino de la sekva majo; la rilatojn kun ekstermovadaj asocioj kaj diversajn anoncojn. Tio ĉi okazis meze de frandaĵoj.

Pli da atento ricevis la perspektivoj por pli-malpli proksima estonto, pro la ambiciaj sed konkretaj agadaksoj: aranĝo ĉiumonate de atelieroj pri fotado, kuirarto, pentrado ktp, preparo de lokaj e-istoj en seminario por KER- kaj movadaj ekzamenoj en 2024 kaj 2025, invito al la organizo de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) decembre de la venonta jaro en Togolando.

Pro sia kreskanta aktiveco, Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO), alinome TogoPlus, kreskas ankaŭ laŭ nombro da personoj, sed ĝi el la financa vidpunkto restas malfortika. Sur internacia skalo ĝi petos por la komenciĝinta jaro UEA-membrigon por kelkaj membroj, kiuj diligente partoprenas en la lingva lernado. Duondeko da ili krome enskribiĝis kaj sekvas enretlecionojn de Françoise Noireau respektive ĉe niveloj 1 kaj 2.

Kiel togolanda grupo ni ne nur celas Togolandon, sed ankaŭ Afrikon kaj kial ne la tutan mondon. Ni ricevas kaj plenumas servojn por aliaj organizaĵoj, ekklopodas por relanĉi ankaŭ nian eldonan agadon. Fakte estas plano aperigi laŭ eble kaj regule revuon kun novaĵoj pri Esperanto en la kontinento. Krom Esperanto, la evea kaj la franca estos probable ankaŭ la lingvoj de la redaktejo.

---

# La gajnintoj de la konkurso "Partoprenu IJK-n 2024"

TEJO ĝojas anonci la plenan liston de la gajnintoj de la konkurso "Partoprenu Internacian Junularan Kongreson 2024".

Espoir Ngoma Kasati (DR Kongo) Kaleth Ochoa Rojano (Kolombio), Santiago Esmeral (Argentino), Ŝujano Hou (Ĉinio), Logan Hall (Usono). La Fonduso Partoprenu la IJK-on de TEJO subtenos ilian vojaĝon al Šventoji, Litovio por partopreni kaj kunlabori al la plej mojosa evento de la jaro, la Internacia Junulara Kongreso 2024. Gratulon al la venkintoj kaj bonan vojaĝon!

Pluraj junaj esperantistoj el la tuta mondo partoprenis en la konkurso. Ni varme dankas ĉiujn pro ilia partopreno!




Ĉu vi volas subteni la Fonduson por helpi pli da junuloj de ĉie partopreni en la IJK? Skribu al *ijk2024@tejo.org*.

***www.tejo.org/gajnintoj-partoprenu-ijk-2024/***

# Intervjuo kun e-isto Apelete, ano de la Evea Akademio

Apelete Agbolo



*Saluton! Ĉu vi povas prezenti vin al la legantoj?*

Saluton, kara Adjévi. Mi estas Apelete (Afelete) Agbolo, esperantisto en Togolando.

*Vi estis ricevanta akton de ministro, kiu nun igas vin oficiala membro de la Evea Akademio. Gratulon! Pri kia noto temas kaj kiu estas ĉi tiu ministro? Tiu ĉi ceremonio (via enoficigo) okazis kiam, kie kaj kiom da homoj partoprenis ĝin?*

Dankon! Temas pri ministeria dekreto, subskribita de la ministro pri la Supera Edukado, sub kiu evoluas la Akademioj. La oficiala enoficigo okazis la 30 -an de majo 2024 en DPIP ĉe la ŝtata universitato de Lomeo; sed mi memorigu, ke la dekreto estis subskribita en marto 2024. En la ceremonio partoprenis ĉiuj akademianoj (malnovaj kaj novaj) kaj reprezentanto de la ministro. Entute, kvardeko da personoj. Ankaŭ kelkaj pro okupoj siaj ne povis partopreni en ĝi.

*Jam de kelkaj jaroj vi estas proksima al la Akademia mondo, kial nur nun oni oficiale enpostenigis vin? Certe estis pluraj kandidatoj por ĉi tiu Akademia posteno, sed kiel vi sukcesis esti akceptita kiel membro de la Akademio? Laŭ via opinio, kio estis en via favoro por ke via kandidatiĝo estu akceptita?*

Jes, ekzakte, 9 jarojn mi kunlaboras kun la Akademio. Se nur nun mi oficiale enposteniĝis, tio estas simpla: antaŭ ol eniri la Akademion, necesas vakaj postenoj okaze de forpasoj, ĉar la membreco estas dumviva. Kaj la anstataŭigo okazas ĉiun dekan aŭ dekkvinan jaron. Finfine montriĝis neceso pri novaj aktivuloj; fiksa nombro da membroj estas kvardek (40). Tio ne temas pri kandidateco sed pri propono de aŭ al la ministro por anstataŭigo de forpasintaj membroj. Tiel la ministro aŭ la estraro de la Akademio proponas nomojn laŭ aktiveco de la kandidatoj pri antaŭenigo de la evea lingvo (ĉu instruante, ĉu publikigante romanojn aŭ similajn librojn en kaj pri la lingvo…). Miaflanke, mi pensas ke miaj kontribuoj kadre de informadikaj terminologioj kaj instruado kaj aliaj diversaj agadoj balotis favore al mi. Mi precipe agadis kunlabore kun la komisiono pri publikigo (ĉiujaran kalendaron), la komisiono pri kreado de terminologioj kaj eksplorkomisiono. Lastjare mi kunlaboris kun la komisiono pri unulingva vortaro. Entute dekkvar novaj membroj eniris la Akademion. Inter ili troviĝas tri universitataj instruistoj (pri lingvistiko evea) kaj aliaj diversaj agadkampuloj. Mi volas ankaŭ sciigi, ke la nomojn oni proponis ekde 2021 kaj la ministerio faris enketojn ktp pri ĉiuj antaŭ ol eldoni la dekreton.

*Kio estas la rolo de la Akademio en la konservado, diskonigo kaj valorigo de la evea lingvo? Ĉu vi povas rakonti pri la praktikaj faroj de la akademianoj?*

La Akademio respondecas pri bona evoluo de la lingvo ĉiukampe: kreo de terminologioj, reguligo de la norma uzo, produktado de gramatikaj lernolibroj, kunlaboroj kun la evea Akademio de Ganao ktp. Praktike, la Akademio ĉiujare aperigas kalendaron evelingvan, elsendas ĉiusemajne ĉe tri enlandaj radiostacioj (Radio Lome, Ephata kaj Radio Maria Togo). Aliaj komisionoj de la Akademio laboradas siaflanke, ekz. per vizito al lernejoj por kontroli la instruadon fare de la instruistoj ktp.

*Kio estas la avantaĝoj, utilecoj de la agadoj kaj aktivaĵoj de la Akademio por la evea-parolantoj?*

Nuntempe, pluraj personoj (eveoj precipe) misuzas la norman evealingvon; la rolo de la Akademio ĉi-kadre estas reguligi la uzadon (tio inkludas ankaŭ akcepton de fremdaj vortoj kiuj nepre devis eniri la ĉiutagan vivon de la popolo; mi jam donis ekzemplon de komputilo aŭ novaj teknologioj…). Kontrolo de la publikaĵoj en la evea, lingvo de eveoj, ankaŭ helpas enprofundiĝi en la kono,



uzo de la lingvo.

*Vi estas konata e-isto kaj nun, ke vi estas membro de la Akademio de la evea, kion togolandaj esperantistoj povas atendi de via nomumo kaj se vi estus havinta eblecon alparoli togolandan esperantistaron, kion vi estus dirinta al ili?*

Mi havis tre ĝojigan sperton kun la Esperanto-movado kaj jam en la jaro 2003 mi komencis redakti dulingvan vortaron (Eo – Evelingvo / Evelingvo—E-o) antaŭ ol prokrasti tion. Mi pensas, ke nun estas la okazo reaktualigi ĉi tiun projekton kaj prezenti Esperanton al la evea popolo alimaniere. Multaj projektoj kiel tradukado al kaj el ambaŭ lingvoj eblas. Mi pensas, ke ni povas kunlabori (tiuj, kiuj ŝatus) por samtempe enprofundigi nian konon de la denaska lingvo por disvastigi Esperanton. La ĝenerala emo nun, precipe de afrikanoj estas reiri al tradicioj afrikaj, kompreneble al ankaŭ naciaj lingvoj. Ni helpu al tio per Esperanto, kiu estos dua (internacia) lingvo ilia.

*Se estas aferoj por proponi por plibonigi klopodojn en la disvastigado de Esperanto en Togolando kaj en la mondo, kion vi proponus?*

Esperanto subtenas denaskajn lingvojn. Ni profitu el tiu favoro por ĝia disvastigo en la evea popolo. Kunlaboro kun la Akademio en multaj manifestacioj helpos al tio (internacia Tago de denaskaj lingvoj, radio-elsendaj programoj ktp.)

*Ni alvenis al la fino de ĉi tiu intervjuo. Dankon. Ĉu vi havas apartan mesaĝon por la legantoj?*

Jes, mi volas aparte danki al vi unue pro viaj klopodoj enradikigi Esperanton en Togolando, Afriko per kunlaboroj kaj diversaj aferoj. Gratulon! Ankaŭ al ĉiuj kiuj faras simile mi dankas.

**Intervjuis la redakcio**

---

## Grimpu Kilimanĝaron kun esperantistoj…

Ĉu vi ŝatus grimpi Kilimanĝaron kun e-istoj ĝis la pinto de la monto antaŭe la antaŭkongresaj ekskursoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto? La grimpado ekos de la 22-a ĝis la 28-a de julio 2024. Jam aliĝis esperantistoj al tiu neforgesebla ekskurso. Se vi interesiĝas, tuj kontaktu la LKK-n de la 109-a UK per: *esperantotz@gmail.com.*

Vi povas spekti la filmeton de la antaŭa farita grimpado kun la esperanta flago ĝis la pinto. *https://youtu.be/qQW0rfCZmI8?si=FoI4OSzj8DvpRtFG.* Bv. sekvi la kongresan paĝon per *https://www.facebook.com/share/p/WsfLwLSMejEg7DeW/?mibextid=oFDknk.* Aliĝu al la 109-a UK ĉe *uk.esperanto.net.*

# Benina junulinaro renkontas nian lingvon




Komence de marto 2024, okazis ĉe la porknabina Liceo de Lokossa la unua kurskunveno kadre de la projekto pri virina agado fare de la NRO *Infanoj Ĉirkaŭ Afriko*. Sekve de reklamoj aliĝis 74 knabinoj, el kiuj ĉeestis la kurson sesdek du. La kurso fokusiĝis pri la alfabeto. Sur tabulo kontraŭ la muro, estis skizita dukolumna tabelo. Unu kolumno entenis la 28 literojn kaj la alia estis rezervita por la prononcmaniero. La prononcmanieron mi skribis en la taŭga loko ĉe la fino de la kurso.

Je la fino de la lernojaro, la kursaninoj ekzameniĝos. Ververe, mi miris pri la rapida kresko de la nombro de aliĝantoj. Tion mi tute ne antaŭvidis sed nun devas elturniĝi. Komence, mi prononcis, unu post la alia, ĉiun literon kaj la kursanaro komune ripetis poste. Tri provojn poste, deko da kursanoj, hazarde elektitaj, laŭvice, proksimiĝis al la tabulo kaj, per longa liniilo, montris la literojn, kiujn ili individue prononcis. Kompreneble, la plej bonaj sukcesontoj ricevos premiojn.

Donaco ĉiaspeca por helpi efektivigi la aferon estas bonvena. Monhelpo, laŭeble, de malavaruloj estas bonvena ĉe mia UEA-konto: ”gbla-e”. Kia ajn estos via kontribuo, ĝi utilos.

Por pliaj informoj pri la agado, bv. rilati kun la projektportanto retpoŝte:
*latifougbadamassi@yahoo.fr*,
*infanojcxirkauxafriko@gmail.com*

# Alvoko por subteni projektojn de afrikaj esperantistoj

2024 estas la jaro de la unua UK en Afriko. Ĉiuj diversmaniere kontribuas al la disvastigo de Esperanto en la kontinento laŭ sia eblo.

Post interkonsiliĝo fine aperis reta paĝo por kolekti la projektojn naskiĝintajn ĉe afrikaj e-istoj kaj serĉantaj financan subtenon: *https://www.esperanto-afriko.org/category/dokumentoj/unuopaj-projektoj/*.

La laboro estas farata de Adjé Adjévi, kiu kunlaboras kun E-Plus. Sed por subteni la agadon de E-Plus vi laŭeble ĝiru al ĝi sen engaĝiĝo pagon de 6 € (aliĝkotizo), 10 € (monatkotizo) 60 € (duonjara kotizo) aŭ 120 € (jarkotizo) al la UEA-konto ”epls-g”.

Fondita en 2013 kaj kunlaboranta kun UEA ekde 2021, E-Plus celas disvastigi Esperanton danke al solidarecaj rilatoj. Ĝi proponas kunigi grupojn da subtenantoj por subteni e-stojn en Afriko, kaj kontakteblas retpoŝte per *sekretario.esperanto.plus@gmail.com*.

# Neforgesebla ekskurstago en la perlo de Kloto



Grupa fotiĝo ĉe la enirejo de la akvofalejo de Wome

11 E-kursanoj – el kiuj unu infano – kaj mi estis en la montoj la 25-an de majo 2024. Estis neforgesebla ekskurstago en la regiono de Kloto. Komuna piedumado jen sur krutaj padoj, jen inter arboj, freŝa bano ĉe akvofalejo meze de verdaj vegetaĵoj, malkovro de nomoj de arboj en Esperanto. Disdono de kalendaretoj al ĉiuj kun informoj pri Esperanto kaj la movado en Togolando. Tre interesaj estis ankaŭ ludoj, dum kiuj Esperanto estis prezentata kaj instruata kaj kelkajn vortojn kaj frazojn ĉiuj ĥore ripetis. Jen la konsisto de la aktivaĵoj dum la ĵus freŝa aranĝo de Agado por la Progresigo de E-o en Togolando (APETO) post tiu okazigita en marto kune kun gestudentoj de la ŝtata universitato de Lomeo.

Estis nuba kaj preskaŭ ankoraŭ pluva mateno en Lomeo, sed tio ne povis malhelpi nian volon fari tiom longe sopiratan ekskurson. Nia grupeto de decidintoj kaj vojaĝemuloj renkontiĝis antaŭ la kolegio Sankta Jozefo. Surhavante bone plenigitajn dorsosakojn, fortikajn piedŝuojn, poŝtelefonojn plenplene ŝargitajn kaj provizojn por la tago, ni enbusiĝis direkte al la regiono de Kpalime, pli ol 130 km nordokcidente de la ĉefurbo Lomeo, renkonte al la loka flaŭro.

Post ĉ. unu kaj duonhora veturado, ni ekvidis tiun majestan monton – pinton de Agu, la plej alta monto en Togolando – leviĝi antaŭ ni, anoncante ke ni baldaŭ alvenos al la urbo Tove. Iom pli antaŭen ni haltis ĉe la eksperimenta kampo de Togolanda Instituto pri Agronomia Esploro (ITRA). Temas pri vasta esplorkampo kuŝanta sur pluraj hektaroj kie estas kultivitaj kafarboj, kakaujoj kaj aliaj plantoj, prezentante belegajn vidojn. Dum duonhoro ni estis solaj, en unueco kun la naturo, kaj kun la sento de libereco kaj de nepriskribebla kontentiĝo.

Dum la suno estis ĉe sia zenito kaj la ĉielo estis iom pli klara, ni alvenis al Kpalime ĉe antaŭe interkonsentita manĝejo kun malplenaj stomakoj. Maŭena kaj lia edzino elportis la antaŭmenditajn manĝojn por ni kaj ni sidiĝis ĉe la tablo por meritata tagmanĝo. Fufu kun freŝa saŭco de kapraĵo kaj refreŝigaĵoj gustis pli bone ol iam ajn, kaj tiu kunmanĝo igis la momenton eĉ pli speciale interesa meze de ludoj, dum kiuj estis prezentata Esperanto kaj enkondukataj kelkaj vortoj kaj frazoj, kiujn ĉiuj ripetis ĥore. Ĉiuj ricevis flugfoliojn kun informoj pri la internacia lingvo kaj iuj gajnis en kvizo Esperantajn t-ĉemizojn.

Finiĝis la regalo de tiu tipa manĝaĵo, venis nun la tempo komenci la botanikan viziton ĉirkaŭ la vilaĝo Yoh per spertumaj padoj kaj krutaj vojoj. Ni estis akompanataj de Jean Luc Koffi, nia surloka kontaktpersono, kiu klarigis multajn aferojn al ni pri la loko, la plantoj. Kun li ni povis ankaŭ diskuti ĉiujn temojn kaj levi demandojn pri la loka medio. Ni lernis la nomojn de pluraj arboj kaj iliaj virtoj danke al la klarigoj de nia gvidisto kaj ankaŭ per teknologia rimedo kiel plantrekona aplikaĵo de niaj poŝtelefonoj.

Alia kaj lasta vizitcelo de la tago estis la fama akvofalejo de Wome. La malbona vojo bremsis la normalan iradon de nia buseto, sed la ŝoforo lerte alfrontis la defiojn, kiujn konsistigis la truoj sur la vojo. Jen ni finfine alvenis ĉe la dekliva preskaŭ vertikala ŝtuparo tra la arbaro kun belega panoramo al la valo. Post ĉirkaŭ 15-minuta ŝtuparmarŝado antaŭ ni aperis miriga sceno: akvojetoj fluantaj el ŝtonblokoj meze de majestaj

arbroj, vera plezurplena loko. Gajaj ridoj, malstreĉaj krioj kaj ludoj, pli ol unu el ni ne povis rezisti la emon naĝi en la akvo. En la akvo ĉiuj forgesis sian aĝon por momento kaj revenis al sia hela infanaĝo, kiam ŝajnis, ke la tuta mondo povis esti tenata en la manoj... Ili tiom amuziĝe ĝuis, ke la foriro okazis malfacile kun emocio.

Kvazaŭ la tuta tempo ĉe la akvofalejo daŭris nur du minutojn, vole aŭ nevole ni retrovis la ŝtuparon kaj reiris supren. Niaj kruroj estis lacaj sed niaj koroj estis plenplenaj je neforviŝeblaj memoroj pri ĉi tiu tago pasigita en la montoj. La programo kaj kondiĉoj dum la tago kontribuis al la aktiva interkomunikado kaj helpis pli bone ekkoni, lerni unu la alian kiel reprezentantoj de diversaj enlandaj etnaj grupoj. Kiel ĉiam dum similaj aranĝoj, la unika etoso de amikeco kaj interkompreno regis inter ni, plifirmigis la interhomajn ligojn inter ni kaj vokas al la estonta kunagado cele al la disvastigo kaj antaŭenigo de Esperanto-movado. Tiom la reagoj de homoj estis multe kuraĝigaj! Sincerajn dankojn al ĉiuj, kiuj kontribuis al la sukceso de tiutaga aranĝo!



# Esperanto en la 3-a Arta Salono de Lomeo en Togolando



Emblemo de la 3-a ASL

En Togolando, informagadoj pri Esperanto pluokazas. Konkretaj aktiveco kaj publika elpaŝo en ĉi tiu direkto okazos ĉirkaŭ la monato de Esperanto. Nia lingvo estos reprezentata, sub la aŭspicio de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO), en la 3-a Arta kaj Literatura Foiro de Lomeo. APET-uloj precipe deĵoros ĉe budo, montros verkojn de togolandaj e-istoj, disdonos informilojn, parolos pri lingvaj rajtoj kaj Esperanto. Tion ĉi decidis kunveno de nia grupo, kiu ankaŭ aprobis plurajn proponojn por vigligo de la movado en Togolando.

La aktivaĵoj de ĉi tiu kultura kaj arta aranĝo okazos de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2024 ĉe la esplanado de la publika kunvenejo de Lomeo. Dum semajno, temos pri konigo kaj valorigo de arto, kulturo kaj turismo ĉe la partoprenanta publiko. Tiu ĉi foiro donas eblon al artistoj, verkistoj, manlaboristoj, kantistoj, pentristoj komuniki pri siaj kreaĵoj kaj igi siajn diversajn verkaĵojn videblaj.

La renkontiĝon organizas s-ino SOSSOU Séfako Amè Valérie, la 2-a vicurbestro de la municipo Golfe 2 interkonsente kun la enlandaj ministerioj respondecaj pri la teknika edukado kaj metio kaj kulturo sen forgesi la zorgantojn pri tradiciaj kutimoj kaj moroj.

Notu, ke e-istino Kossivi Massan Judith, diplomito de ESTBA, Altlernejo pri Biologiaj kaj Manĝaĵo-Teknikoj, renkontis kun la iniciatinto de la salono. Ili babilis ne nur pri Esperanto, literaruro, sed ankaŭ pri kunlaboro, nome ebla partnereca rilato kun APETO.

Estus tre interese ke ni povas sciigi tion, kion togolandaj e-istoj verkemuloj kaj pentristoj faras kaj kiel tio helpas kontribui al antaŭenigo de ĝenerala afrika kulturo. E-budo estas mendita. Nun restas solvi pri kostoj de printado, kopiado de materialoj, transporto de deĵorontoj kaj helpontoj. Bedaŭrinde ni mem ne povas ĉion kovri, pro limigita rimedo.

Dankon, ke vi tralegis, ke vi subtenas niajn agadojn en Togolando, tiujn de APETO, tiujn de UEA, kun granda sindonemo. Viaj mondonacoj al la konto "Afriko" de UEA kun mencio "Agado en Togolando" ankoraŭ estas bezonataj, aparte nun bonvenaj kaj ne malpli dankataj.

# Ĉu nur ĝirafoj, leonoj... okaze de la 109-a UK en Aruŝo?




En la urbo Aruŝo, kie okazos la kongreso, post la seminario organizita de la projekto *Hakuna Matata* januare 2024 sub la gvido de prof. Francesco Maurelli, d-rino Sara Spano, Jérémie kaj Constantine, krom aliaj sukcesoj, revigliĝis la Esperanto-klubo de Aruŝo. Okazas du fojojn semajne lingva instruado al 25 ĝis 30 studentoj (enloĝantoj de Aruŝo, gestudentoj de diversaj altlernejoj kaj kolegioj, kunlaborantoj kaj funkciuloj de AICC) ĉe la Aruŝa Komputila Centro gvide de John Magessa kaj Mika Ayo, danke al subteno de UEA kaj *Kosmo Strategio* kadre de *Hakuna Matata.*


Post longa diskuto inter la LKK kaj la estraro de la Nacia Turisma Kolegio de Aruŝo, oni akceptis enkonduki E-kursojn unufoje semajne (ĉiuvendrede). Studentoj amase partoprenas la kursojn, esperante partopreni la kongreson kaj utiligi la lingvon post la 109-a UK. 2 instruistoj de la kolegio ankaŭ aliĝis al la kurso. John Magessa gvidas la kursojn ĉi tie.

Siaflanke, Mulele Mbassa, Paul Kusaya kaj Dismas Kusaya instruas la lingvon en Bunda, kie aliĝas kaj gejunuloj kaj plenkreskuloj al la kurso. Krom tio e-istoj de diversaj regionoj de Tanzanio, al kiuj Mulele rete instruas, renkontiĝas por ĉeeste praktiki la lingvon.

David Mapengo kunlabore kun Mramba Simba gvidas E-kursojn ĉe la Esperanto-mezlernejo. Tie centoj da gelernantoj lernas la lingvon. Inter tiuj gelernantoj 50 intencas partopreni la UK-n se estos rimedoj.

**El raportoj de John Magessa**

# Reaktiviĝis la madagaskara landa asocio




Ranja L. Zafinifotsy estas elektita la nova prezidantino de la Landa Asocio en Madagaskaro (UME) la 6-a de januaro 2024.

Ŝi skribas: *Mi prenas ĉi tiun rolon kun granda respekto kaj fervoro por pliigi la entuziasmon kaj partoprenon en nia asocio. Nia asocio nun havas kelkajn novajn membrojn, nome 25 virinoj kaj 14 viroj.*

Estas gajige vidi la kreskon de UME kaj la diversajn spertojn, kiujn ĉiuj novaj membroj alportas al ĝi. Novaj membroj helpas nutri la kapablon de la asocio atingi ĝiajn celojn kaj krei ankoraŭ pli ageman kaj buntan komunumon. Estas granda espero pri la estonto.

# Tanzanio funebras



E-istino Elizabeth J. Shanyangi forpasis. Ŝi subite malsaniĝis kaj mortis pro kancero 7 maj. 24.

Naskita la 20-an de aŭgusto 1965, Elizabethest, patrino de 2 filinoj, laŭprofesie estis instruistino kaj ĝis sia morto aktiva e-istino. Ŝi estis membro de la Viktoria E-klubo kaj partoprenintо de la 6-a kaj 7-a Afrikaj Kongresoj de Esperanto respektive en 2016 kaj 2019. Ŝi estis ankaŭ unu el la fondintoj de la Virina Agado en Mwanza.

La morto de Shanyangi kaŭzas perdon por la tanzania movado. Kondolencon al ŝiaj konatoj. Ŝia animo ripozu en paco.